

## EŬROPO ESTAS GRAVE MALSANA

La moderna familia politiko disfaligas ekonomian kaj kulturalan vivon kaj ĝi estas rilate al la dezirata ĝenerala bonfarto neeltenebla. Ĝia konsekvenco estas, ke la esenca parto de la eŭropa socio estas psike malsana. Studo de la Eŭropa Konsilantaro por Problemoj de la Cerbo (EBC) ellaborita fare de neurologoj kaj cerb-esploristoj el ses eŭropaj landoj kaj Usono konkludas, ke ĉiu tria eŭropano estas psike malsana. Proksimume unu triono de la civitanoj permanente suferas per statoj de timemo, migreno, deprimiĝo kaj per sekvoj de la cerbaj okazintaĵoj. 27 %, tio estas 127 milionoj de la civitanoj montras gravajn psikajn kaj somatajn ekmalsaniĝojn kaj tio kostas socion dumjare 368 miliardojn da €. Rezulto de tiu situacio estas oftaj memmorigaj provoj. Laŭ unu svisa studo por Eŭropa Konvencio de la Homaj Rajtoj el la jaro 2003, kies titolo estas „La Prezo de la Malespero“, kostas la sekvoj de la memmortigeo nur en Svislando jare 2,4 miliardoj da frankoj.

La ĉefa kaŭzo de tiu ĉi tuteŭropa situacio laŭ EBC estas „kreskanta neeltenebla streso en laborlokoj kaj en familioj“. La homa cerbo en la kreskanta streso de la moderna civilizacio ne elkreskis.“ La rezulto sin montras en la konsumado de la medikamentoj, alkoholo, en bipolaraj difektoj, ŝizofrenio, deprimoj, timemaj statoj, cerbaj tumoroj, epilepsio, migreno kaj demenco. La kaŭzo ofte kaŝiĝas en la senesperiga situacio en la laborloko kaj en la persona perspektivo, precipe en la landoj de la orienta parto, kie la homoj estas elreviĝintaj pro neplenumitaj esperoj post reĝimrenversoj. Ne estas eble forgesi la kreskantan malriĉecon kaj la fakton, ke alkreskas nombro de la homoj, kiuj

estas dependaj de la ŝtato financataj ekzist-minimumoj.

Laŭ interreta esploro en Svislando el la 5-a de junio 2005 estas 37 % de la enloĝantoj en Svislando malkontentaj rilate al la etika konduto de la laboronantoj. La provojn pri la memmortigo oni kalkulas je ĉirkaŭ 60 mil.

Malrespekto al la rajto de la vivo de la unuopulo kaj la familio kondukas senrevene al la malbona konstruado de la ŝtato kaj la ekonomio. El tio rezultas nepre bezono komenci sur ĉiuj niveloj resanigajn procesojn, unualoke staras renovigo de la kristana mesaĝo. Tio estas globala tasko. La renoviĝanta inklino al la religio estas signo, ke la resaniga proceso jam komenciĝis. Ke la intense travivata kristana kredo kontribuas al tio, por ke la homo tute ne ekmalsaniĝu, estas jam delonge multfoje pruvita.

Paralele kun tio devas resaniĝi ankaŭ la civitana socio. Tio estas la tasko de la politikistoj kaj ankaŭ de ĉiu unuopulo. La ekonomia sistemo devas esti alikonstruita je sociale koncipita ekonomio. La moderna ekonomia sistemo estas por la komuna bonfarto tute neakceptebla. La franca kaj nederlanda NE al la Eŭropa Konstitucio estas krisigno kontraŭ nehomecaj ekonomiaj strukturoj kaj deformato de la familio. Tiun krisignon estas necese trakti serioze. Anstataŭ al la ekonomio orientita familio devas ekaperi al la familio orientita ekonomio („Preĝu kaj laboru“ en familia ekonomio): familia strukturo, familia ekonomio, familia medicino, familia kulturo. Estas necese definitive disiĝi kun marksista kontraŭfamilia politiko. ■

*Kath-net, 2005*